# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstr
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz


Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

**La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906**
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**OKTOBRO/DECEMBRO 2023** **Nro. 137 (4/23)**

## ZAMENHOFA NASKIĜDATREVENO.




Kiel kutime, ankaŭ ĉijare ni festos la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto (15/12/1859).

**<u>Kunveno okazos la vendredon 15an de decembro, je la 19:00 h.</u>**

## LOKE

## ZAMENHOFA NASKIĜDATREVENO.




Ĉifoje ni organizos demandokonkurson pri Esperantaĵoj. Estos donacoj por la partoprenantoj.

Post tio, estos simpla komuna noktomanĝo ĉe nia sidejo. **<u>Vi ne bezonos kunporti manĝaĵojn</u>**. Ili, kune kun trinkaĵoj estos alportataj de la Grupo.

Tre speciale ni alvokas novbakitajn esperantistojn de la lastaj jaroj.

Ne forgesu:
**<u>Vendredon 15an de decembro je la 19:00 h.</u>**

## KRISTNASKA LOTERIO.



ESPERANTO

Esperanto-Grupo

www.esperanto.net

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO

Nacia Loterio N.º 72.944

La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2023.

4,00 eŭroj
(MON-DONACO: + 1,00 €)

GRUPO ESPERANTISTA
Barrencalle Barrena
0001

En caso de premio, este número estará sometido a los gravámenes que establece la legislación tributaria vigente.
Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea

Imprenta MENDI

Kiel ni jam anoncis plurfoje, ankoraŭ eblas aĉeti biletojn de la tradicia kristnaska loterio.

Memoru ke ni rezervas biletojn al neniu.

Lasta tago por aĉetoj:

**<u>Vendredon 15an de decembro</u>**.

# Solidara evento kun Esperanta partopreno.

La pasintan 21an de oktobro, "Punta Galea Txirrindulari Elkartea" ("Asocio de biciklemuloj Punta Galea") el urbo Getxo (pr. Geĉo), 13 km. norde de Bilbao, okazigis solidaran festivalon por helpi malsanulojn, kiuj suferas amiotrofan flankan sklerozon (ELA, laŭ ĝia hispana akronimo).




Interesa por ni estas la fakto ke, danke al perado de nia amiko Iñigo Velasco, unu el la teamoj surportis ĉemizojn kun la vorto Esperanto kaj la verda flago.

Sur la foto, Iñigo estas tiu, kiu aperas plej maldekstre, preskaŭ kaŝita de alia biciklanto.

## LOKE

# Hispana kongreso en Sevilo.

Inter la 12a kaj 15a de oktobro oni okazigis la 81an kongreson de Hispana E-Federacio en la belega kaj varmega urbo Sevilo (Sevilla). Entute estis 150 aliĝintoj kaj, inter la partoprenintoj, kvar membroj de nia E-Grupo.



Sur la ĉi apuda foto, ili pozas kun Sro. Duncan Charters, Prezidanto de UEA, kaj lia edzino.


Denove la kvar bilbaoanoj, kun Pako, amiko el urbo Leono.





Kaj ĉi tie kun Echedey, el Kanariaj Insuloj.

## VIZITIS NIN.



La pasintan 29an de oktobro vizitis nin Carlos Barrio. Antaŭ multe da jaroj li estis aktiva membro de nia E-Grupo. Nun li loĝas en Germanio kune kun sia edzino Ulrike Werner.

Ili ambaŭ aliĝis al nia asocio.

Bonvenon!



Kaj la 17an de novembro vizitis nin Oscar, juna fizikisto el Barcelono kaj respondeculo pri scienco en TEJO.

La saman tagon ankaŭ vizitis nin, post multe da tempo, nia amiko Joxemari Sarasua.

Sur la apuda foto staras Oscar kaj Joxemari kune kun aliaj membroj de la Grupo de Bilbao.

## JARKOTIZOJ 2023.

Baldaŭ finiĝos la jaro 2023. Se vi ankoraŭ ne pagis vian kotizon, faru tion kiel eble plej rapide. La E-Grupo de Bilbao bezonas ĉies helpon.

Sur la frontopaĝo de ĉi tiu “Nia Ponto” vi trovos la kotizojn kaj la konto de nia Grupo.

## CUOTAS 2023.

Pronto se va a terminar el año 2023. Si todavía no has pagado tu cuota de socio, procura hacerlo lo más rápidamente posible. El Grupo Esperantista de Bilbao necesita la ayuda de todos.

En la portada de este “Nia Ponto”, encontrarás el importe de las diversas cuotas y la cuenta en la que puedes hacer el ingreso.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

- 2024 IJK. Ŝventoji (Litovio).
- UK. Aruŝo (Tanzanio).
- 82a Hispana kongreso. Cheste (Valencio). Septembro 2024.

## KIAL NE ALIĜI AL HEF?

Hispana Esperanto-Federacio malfermis jam sian novan kampanjon de aliĝo al la asocio por la jaro 2024.

Oni povas trovi la retan aliĝilon ĉe: http://www.esperanto.es/inscripcion.

Kaj oni povas legi kialojn por aliĝi al la asocio en tiu ĉi paĝo: http://www.esperanto.es/hef/index.php/nia-asocio/kial-aligi

Memoru ke nia asocio estas neprofitcela kaj nur kalkulas je la kotizoj de siaj anoj por antaŭenigi la disvastigon de Esperanto. Krome, pro la deklaro de "publika utileco", la kotizoj kaj aliaj donacoj al la Federacio ĝuas altajn fiskajn avantaĝojn. Skribu al admin@esperanto.es se vi deziras koni la detalojn. Ni atendas vin ĉiujn!

*(Hispana Esperanto-Federacio. http://www.esperanto.es/ )*

Os recordamos que la cuota anual de socio de HEF es de sólo 40,00 euros anuales (30,00 si se decide recibir “Boletín” en formato digital), con descuentos para los jóvenes de menos de 30 años y para los que tengan dificultades económicas.

Por otra parte, al ser una asociación de utilidad pública, al hacer la declaración de la renta (**IRPF**), en Bizkaia, se tiene derecho a una **deducción del 30%** de la cuota de socio. Esa deducción aparece, automáticamente, en el borrador del IRPF que remite la Diputación Foral de Bizkaia.

## RELANĈITA LA RETO DE E-INSTRUISTOJ EN HISPANIO

Lastatempe estis relanĉita la Reto de Esperanto-Instruistoj en Hispanio, organizita kiel la hispana sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Unu el ĝiaj unuaj agadoj estis la konstruado de retejo dediĉita al la organizaĵo, al instruado kaj Esperanto, kiun vi nun povas konsulti ĉe la adreso https://ilei.esperanto.es.

Se vi rilatas al edukado kaj Esperanto, aliĝu kaj kunlaboru. En la nova retejo vi povas vidi ĉiujn kontakteblecojn.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 91. Nov. 2023)*

### APEROJ EN GAZETARO

Pedro Hernández estis intervjuita por la madrida eldono de la ĵurnalo “El Mundo”. La novaĵo okupis preskaŭ unu tutan paĝon en la papera eldono, kaj povas esti malferme legata rete.

La retgazeto "El Diario" aperigis raporton pri la strato Doctor Zamenhof en Madrido, kaj la bedaŭrinda stato en kiu ĝi troviĝas.

En Argentino la grava ĵurnalo "Clarín" redaktis intervjuon kun Jorge Montanari, kun speciala fokuso pri lia laboro koncerne futbalon kaj Esperanto.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 91. Nov. 2023)*

## TRA LA MONDO …

# Deklaro de ELI (E-Ligo en Israelo) pri la Milito en Gaza.

En la spirito de la Zamenhofa revo pri monda paco, Esperanto-Ligo en Israelo kondamnas ĉiujn militojn kaj subtenas diplomatiajn solvojn de konfliktoj, inkluzive de la centjara konflikto inter judoj kaj araboj en la Mezoriento.

Tamen, ne eblas senhorore akcepti la teruraĵojn, kiuj okazis la 7-an de Oktobro: amasa masakro de ĉ. **1,200 israelaj civiluloj**, plejparte infanoj (eĉ beboj!), virinoj kaj maljunuloj, plenumita far la fundament-islamisma ekstremisma teror-organizo **Ĥamas**, kun ne imageblaj kruelaĵoj (inkluzive senkapigon, perfortadon, torturadon kaj vivbruligon de la viktimoj). Neniam post la Holokaŭsto estis tiom da judoj murditaj dum unu tago, nur ĉar ili estis judoj kaj israelanoj (inter la viktimoj pluraj tamen estis ne-judoj kaj eĉ eksterlandanoj).

Estis kidnapitaj pli ol 240 personoj, kiuj daŭre restas en la manoj de **Ĥamas** en la Gaza-Strio, sen ajna informo aŭ vizito de la Ruĝa Kruco. Ili **ĉiuj** devas esti liberigitaj tuj kaj senkondiĉe. Por ke tiaj militkrimoj ne ripetiĝu, nepras ekstermi la regnon de **Ĥamas**.

Bedaŭrinde ankaŭ la palestinaj loĝantoj de la Gaza-Strio multe suferis, suferas kaj suferos pro la milito, kiun iniciatis iliaj Ĥamas-regantoj – tamen ne eviteblas la disrompo de tiu ĉi **teror-organizo** por ebligi daŭripovan solvon de la konflikto kaj estontan rekonstruon de Gaza kaj de la ĉirkaŭa regiono en Israelo, profite por ambaŭ popoloj.

*(Prenita el retejo de ELI)*

# Kontraŭmilita, porpaca deklaro de UEA, TEJO kaj ILEI

La daŭre raportataj novaĵoj pri la aktuala konflikto en Mezoriento reliefigas la sekvojn de militoj por la popoloj de nia mondo, aparte kiam ankaŭ civiluloj estas trafitaj per morto kaj suferado pro vundiĝo aŭ manko de necesaj vivrimedoj.

Ne nur en Mezoriento sed en pluraj mondpartoj okazas dekoj da perfortaj militaj konfliktoj, kiuj pereigas kaj suferigas senkulpulojn, ne esceptante infanojn.

Okaze de la UN-tago, la 24-an de oktobro (vidu la koncernan Gazetaran Komunikon 1136 de la 20-a de oktobro 2023) Universala Esperanto-Asocio ripetas sian firman subtenon de paca solvo de konfliktoj. Laŭstatute neŭtrala pri politikaj pozicioj, UEA, kun la subteno de TEJO kaj ILEI, tamen apogas konfliktsolvadon laŭ diplomatiaj kaj aliaj iniciatoj kaj rimedoj, grupe kaj individue. La Esperanto-parolanta komunumo celas progresigi la homaron al ĉesigo kaj eliminado de militoj, kaj al pli paca kunvivado per transnacia respekto al homaj rajtoj, kiuj inkluzivu lingvan, kulturan kaj socian justecon por popola interkompreniĝo.

La 10-an de decembro ĉi-jare okazos la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu donos al la popoloj la okazon reagnoski ĝiajn principojn kaj idealojn. Tiu ĉi deklaracio en pluraj artikoloj principe kontraŭstaras akcepton de daŭraj militaj konfliktoj. Ekzemple, neniu homo suferu "kruelan, nehoman aŭ sendignigan traktadon" (artikolo 5) kaj ĉiu havu la "rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio" (artikolo 25).

Universala Esperanto-Asocio deklaras sian aliĝon al tiuj principoj, laŭ artikolo 5 en sia Statuto: "bonaj internaciaj rilatoj kaj respekto al la homaj rajtoj ... estas por la laboro

de UEA esencaj kondiĉoj". Ni strebas individue kaj kolektive kun TEJO, ILEI, samprincipaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, por krei la bazojn por daŭra senperforta kaj egaleca interkompreniĝo, celante al natura pacemo inter individuoj kaj popoloj, rekonante ĉies dignon. La iniciatinto de Esperanto, D-ro Ludoviko Zamenhof, inspiriĝis imagi alian mondon, en kiu respekto kaj toleremo anstataŭus perfortadon, kun espero ke nia parolkomunumo donus imitindan modelon por estonta tergloba socio regata de profunde paca interagado.

*(Gazetaraj komunikoj de UEA. Nro. 1137. 25/10/2023).*

## Kampanjo por konservo de la kursoj de Duolingo.




La granda kompanio por reta lernado de lingvoj, Duolingo, anoncis la malaperigon de la kursoj de Esperanto en aliaj lingvoj krom la angla. Tio tuŝas la hispanan kurson, kaj TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) lanĉis kampanjon por tion malhelpi.

Hispana Esperanto-Federacio kaj Fundación Esperanto subskribis la alvokon de TEJO kaj petis la kompanion ke ili konservu la kursojn.
Samtempe, oni ankaŭ lanĉis retan kampanjon, por ke individuoj povu subskribi tiun peton. Vi trovos ĝin ĉe: https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 88. Jul. 2023)*

## Pri la revuo "Esperanto" de UEA.




Ĉar aŭdeblas plendojn de esperantistoj rilate la revuon "Esperanto" de UEA, ni reproduktas enirvortojn al artikolo de eksa ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, pri la afero.

**La revuo sen redakto**

La revuo de UEA suferas de manko de redaktado kaj strukturo. Krome mankas recenzoj, nekrologoj kaj diskutoj, dum la titoloj estas plumpaj. Tion skribas en vidpunkta artikolo Osmo Buller, multjara ĝenerala direktoro de UEA.

*("Libera Folio". 28/11/2023)*


## Deklaracio de homaj rajtoj.

Ĉi-jare okazas la 75-a datreveno de la Deklaracio de Homaj Rajtoj la 10-an de decembro kaj nia tradicia zamenhofa tago la 15-an. Kial ne kunigi la du datojn kaj festi ilin kune? Tion laborgrupeto, kiu interesiĝas pri la afero, Humphrey Tonkin, Rafael Lima kaj mi mem, proponas al vi. Intertempe estas elŝutebla tre bela versio de la Deklaracio ĉe:
https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2023/11/Versio-UDHR.pdf

*(Renato Corsetti. 03/11/2023)*

## **Spritaĵo**.

Neniu ofendiĝu! Temas pri naiva kaj simpla humuraĵo prenita el interreto.




Germanujo

Usono

Rusujo

Ĉinujo

Britujo

Irlando

Hispanujo

Italujo

Francujo

Belgujo

Esperantujo

**LA "GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO" TUTKORE DEZIRAS, AL LA TUTA HOMARO, TRE SUKCESAN, PACAN KAJ FRUKTODONAN JARON 2024-AN.**